

Harz-montaro - Granda naturparko en meza Germanio)

Vizitante la Harz-montaron, oni povas migradi sur la spuroj de Goethe, Heine kaj Andersen. Famaj poetoj volonte kaj multe prikantis tiun mezgermanan montoregionon. Dum la Supra Harz en la okcidento, kun siaj profundaj valoj, estas kovrita per koniferaj arbaroj, sur la ondumita surfaco de la Malsupra Harz en la oriento eblas agrable promenadi.

Fakte la Harz-montaro estas granda naturparko. Pro la iama ekzisto de la du germanaj ŝtatoj post la Dua Mondmilito ankaŭ la Harz-montaro estis disigita en du partojn kaj simpla tramigrado de la tuta montaro ne plu eblis.




La Harz-montaro havas longecon de 90 kilometroj kaj larĝecon de 30 kilometroj kaj situas inter la riveroj Saale kaj Leine.

Kiu alproksimiĝas al la Harz-montaro per aŭto aŭ per trajno, al tiu ĝi prezentas sin de ĉiuj flankoj kiel majesta muro. La alvojaĝanton ĉirkaŭas ankoraŭ la ebenaĵo, sed baldaŭ leviĝas la altaĵoj.

Alproksimiĝante de okcidento, oni rimarkas profundajn entranĉojn, pitoreskajn valojn, kaj belegan panoramon.

Ne eblas seniluziiĝi en la Harz-montaro. Kiu promenas laŭ la murmurantaj riveretoj, migradas tra agrablaj arbaroj sur la montoj, konstante estas ligita al la naturo. Atingante la altaĵojn, la migranto havas belegan panoramon kaj vidas mirindan pejzaĝon. La plej alta monto de Harz-montaro estas la Brocken (1142m). La Harz-montaro estas preferata vizitcelo de turistoj el Berlino kaj el la nordgermana ebenaĵo, sed kompreneble ankaŭ venas multaj vojaĝantoj el la skandinavaj landoj.



La multaj banlokoj, kuraĉlokoj kaj refreŝigaj feriovilaĝoj en ambaŭ partoj de la Harz-montaro estas pretaj bone servi la gastojn. Oni trovas tie pensionojn, gastejojn, hotelojn kaj sanatoriojn por ĉies gusto kaj monujo. La Harz-montaro estas ankaŭ fama regiono por vintraj sportoj. Precipe la Supra Harz kun Braunlage estas konata en skiistaj rondoj.

Parolante pri la Harz-montaro, oni nepre devas mencii ankaŭ la multajn akvobaraĵojn. La riveroj Oker, Ecker, Innerste, Oder, Grane kaj Söse en la okcidenta parto estas baritaj. La valbaraĵo de Oker estas en tiu parto la plej impona. Ĝi havas kapaciton de 47 milionoj da kubaj metroj. La Söse-baraĵo (kapacito de 25,5 milionoj da kubaj metroj) ĉe Osterode am Harz estis finkonstruita jam en 1931, kaj servas kiel trinkakva rezervujo i.a. por la nordgermana havenurbo Bremen, kiu troviĝas preskaŭ 200 kilometrojn for.



Io simila estiĝis ankaŭ en la orienta parto, iama Germana Demokratia Respubliko. Kvar grandaj valbaraĵoj servas kontraŭ inundo. La akvobaraĵo de la rivero Rappbode, kies 106 metrojn alta muro baras la valon, havas kapaciton de 108 milionoj da kubaj metroj. Ĝi estas elirpunkto de distribusistemo, kiu kondukas trinkakvon kaj akvon por alia uzado en la regionojn de la urboj Halle kaj Magdeburg.

En la okcidenta parto de la Harz-montaro, iama Federacia Respubliko Germanio ses naturamikaj domoj staras je la dispono de migrantoj, nome la kabano en Badenhäusen kaj la domoj “Spielmannshöhe” en Seesen, “Braunschweiger Haus” proksime de Bad Harzburg, “Oderbrück” inter Torfhaus kaj Braunlage, la Naturamika Domo en St. Andreasberg kaj la kabano “Weinberghütte” en Bad Lauterberg.

Kompreneble ne nur la montaraj kaj la valaj Harz-pejzaĝoj kaptas la atenton de la turistoj, sed ankaŭ la belaj urboj en la sekvaj regionoj: Goslar, Bad Harburg, Altenau, Clausthal-Zellerfeld, Braunlage, Seesen, Osterode, Bad Grund, Bad Lauterberg, Wernigerode, Quedlinburg, Halberstadt, Schierke kaj aliaj, kiuj enhavas multajn historiajn trezorojn.

Ne estas mirinde, ke tiu belega, alloga kaj varia pejzaĝo movis la fantazion de la loĝantoj de tiu regiono kaj ekestis multaj rakontoj, fabeloj, legendoj.

(Redaktis: Zsófia Kóródy)